
# Naturo de la nuna ekonomia krizo

Estas inter la ekonomikaj fakuloj debato pri la naturo de la krizo kiu nuntempe frapas nian ekonomian sistemon. Ĉu temas pri simpla cikla krizo, kiel iuj asertas?, aŭ, ĉu ni troviĝas antaŭ iu krizo je civilizacio, laŭ alies opinio? Gravas la distingo, ĉar la danĝero kaj la solvo de la problemo estus malsama ĉu temus pri iu aŭ alia krizo-tipo.

La ciklaj krizoj estas nepra komponaĵo de ĉi tiu kapitalisma sistemo kaj ties funkciad-maniero. Tiaj krizoj regule akompanas ĉi tiun socion ekde antaŭ pli ol du jarcentoj. La ekonomikistoj kaj la regantoj bone scias apliki rimedojn al la problemaro de tiutipaj krizoj. La reguligoj nun postulataj kaj aplikataj de la Uson-Prezidento Obama, Eŭropuniaj regantoj k.a. estas efikaj iloj por alfronti la ciklajn krizojn.





Sed ĉi-foje temas pri alia afero. Aŭ pli ĝuste, preter kaj krom la kriza fazo de cikla ripetiĝo, kiu sendube ni travivas hodiaŭ, estas ankaŭ la fakto ke la produktadmaniero de nia industria kaj postindustria tekniko troviĝas antaŭ ia ŝajne senelira vojo. Kaj en tiu situacio nia civilizacio, la mondo, postulas solvojn kaj alternativojn, ne reguligojn.

La superregantoj de la tutmonda ekonomia sistemo celas ke oni eliru el la krizo laŭ la tradicia maniero de la cikla kriz-skemo, t. e. laŭ maniero favora al siaj interesoj, ne al la ĝeneralaj interesoj de la homaro. Sed ni vidos ke la situacio estas tia, ke ĝi ne solveblas per flikaĵoj. Unue ni devas kompreni ke la krizo estas ne nur ekonomia, sed multflanka: financa, pri nutrado, pri energio, pri akvo-manko, pri klimato, socia… Sed oni devas kompreni ankaŭ ke la kaŭzo aŭ fonto de ĉiuj-ĉi problemoj estas la sama: la kapitalista sistemo. Kaj tiu problemaro ne solviĝos dum ne malaperos la kaŭzo kiu generis ilin.

Kiam preskaŭ miliardo da homaj estaĵoj vivadas sub la lim-linio de ega malriĉeco, kiam ĉiutage pereas dekmiloj da personoj pro malsato, kiam senĉese malaperas etnioj, kulturoj kaj vivmanieroj endanĝerante la kulturan heredaĵon de la homaro, kiam la klimato percepteble degradiĝas… oni ne povas temi nur pri financa krizo. La ekonomio-potenculoj zorgas nur pri la financa flanko de la krizo kaj postulas priekonomikajn solvojn, kiuj savos iliajn financojn kaj la sistemon en kiu ili prosperis ĝis nun. Sed la sociaj sekvoj de la krizo kiun ilia monavido provokis tre perceptiĝas ankaŭ malproksime el tie, kie ĝi originiĝis: senlaboreco, altekostaj vivrimedoj, marĝenigo de la plej malriĉuloj…

Kiel dirite, ĉi tiu krizo ne estas la unua de la sistemo, sed ĝi havas karakteraĵojn aperantaj nun unuafoje en la historio de la ekonomiko. La disvolviĝo de novaj teknologioj pri informado kaj interkomunikado kreis la kondiĉojn por la efektivigado de ekonomiaj operacioj kiuj metis la kapitalon kaj ties fluon for de la kontrolo de la ŝtatoj kaj ĉi ties aŭtoritatoj. La ekonomio fariĝis pli virtuala kaj tro grandiĝis la diferenco inter la enspezoj de iuj kaj aliaj personoj. La spekulado fariĝis normala operacio de la ekonomia sistemo kaj kontribuis generi grandajn malekvilibrojn. Ni vidu, ekzemple, la krizon pri nutrado: La plialtiĝo de la prezoj de la nutraĵoj ne estas rezulto de malpliiĝo de produktado sed de spekuladmanovroj kaj de la pliigo de la produktado de agrokarburaĵoj. La vivo de milionoj da homoj estas submetita al la atingado de profito por la kontrolantoj de la ekonomia fluado.

Aliflanke, la krizo pri energio preterpasas la influon de la prezo de la nafto. Okazas ke la mondo troviĝas antaŭ la fino de periodo de malmultekosta energio fosili-devena (nafto, gaso, karbo) kiu karakterigis nian ĝisnunan produktadmanieron. La super-ekspluatado de la naturaj rimedoj, krom pliakceli ties elĉerpiĝadon ankaŭ okazigis konsiderindajn damaĝojn al la ekologio kaj la klimato. La vivmaniero de la superaj kaj mezaj